

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JULIO- AŬGUSTO 2006

Oni povas vidi "Nia Voĉo"-n en la Gazetoteko Lanti. <http://www.gazetotekolanti.com/nv>

INTERNACIE

En la **PEN-mondkongreso** en Berlino, 21-25 majo 2006, la esperanto-literaturo estas reprezentata de c-ano Giorgio Silfer kaj sen. Marie-France Conde Rey. Estis grava la rolo de la esperanta delegacio dum la lastaj monatoj, por solvi kelkajn dornajn problemojn, precipe pri la jura transformiĝo de PEN Internacia. En la Asembleo de la delegitoj, kiun li partoprenas sen aŭskultiloj por interpretistoj ĉar li flue parolas la tri oficialajn lingvojn, prof. Silfer estas unu el la plej atente aŭskultataj, ofte kiel proparolanto de la interna minoritato. La Esperanta PEN reprenis sian inviton por la mondkongreso 2009 en Ĉaŭdefono, kaj male organizos kontinentan konferencon samloke en julio 2008, kunlabore kun aliaj establoj en la Pakto por la Esperanta Civito. (HeKo 229)

Usonaj esperantistoj, en kunlaboro kun ELNA, tradukis la unuan libron de **Harry Potter al esperanto**. Ĝis nun la kontaktoj de ELNA kun la agentejo por ricevi la eldonrajton restis vanaj. Por helpi en tiuj kontaktoj, ni serĉas subtenon ĉe esperantistoj. La celo simple estas montri ke intereso pri tiu traduko ekzistas. Se vi pretas helpi, simple subskribu la liston ĉe <http://www.hp-esperanto.com/>

EN HISPANIO

Jurnalo "**20minutos**" 2006-05-26 paĝo 18a. En la artikolo pri "Museos raros" aperas la Esperanto-Muzeo de Vieno kie "se puede conocer todo sobre la lengua menos hablada"

Manolo **Pancorbo** estis intervjuita en la programo "Cita con Pilar", Radio 3 de Radio Nacional, la dimanĉon 18an Junio

Ni rekomendas la prelegon de Toño del Barrio pri Leonardo **Torres Quevedo**. Ĝia legado interesas al amantoj pri la historio de Esperanto en Iberio. En ĉi epoko iom morna por nia ĉi-tiea movado, estas vere stimulgiga konstati kiel homoj tiom eminentegaj kiel Torres Quevedo interesiĝis pri Esperanto kaj aktive agis favore al ĝi. Legu en:

<http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/torresquevedo.htm> kaj kiel pli ĝeneralan enkondukon ni konsilus pli bone la artikolon <http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/historia.htm> ankaŭ en http://www.esperanto-es.net/historio/1903-2003_cent_jaroj_hispanuje.php

Toño del Barrio verkis interesplenan artikolon en Libera Folio pri sia renkontiĝo kun la fratino de **Petr Ginz**, juna ĉeĥa judo kiu mortis en ekstermokampo germana dum la Dua Mondmilito, okaze de la prezento de la hispana eldono de ties Taglibro (antaŭe aperinta en Esperanto). Petr estis denaska esperantisto, filo de pioniro Ota Ginz, kaj li ne nur parolis nian lingvon, sed eĉ verkis vortaron ĝian dum sia restado en la kampo Terezin. Artikolo pli detala pri li, el "Israela esperantisto", aperis en "Libera Folio", kaj poste en "Esperanto": <http://www.liberafolio.org/2005/persone/petrginz>. En "El País Semanal" ankaŭ aperis artikolo pri Petr:

http://www.elpais.es/articulo/portada/diario/nino/judio/elpepspor/20060611elpepspor_5/Tes/.

En ĝi aperas tre malgranda mencio al Esperanto. La okazo pri tiu mencio estas ke aperis en la hispana kaj la kataluna la traduko de lia taglibro pri siaj travivaĵoj en Prago:

<http://www.acantilado.es/qresnovi.php?var2=aca0130&idioma=cas>

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,30-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

Dank ' al Marcos Cruz la **datum-bazoj de HEF** jam estas en formato **Access**, pli konata de la plej parto de uzantoj de komputiloj. Li mem faris la unuan datumbazon laŭ la programo Filemarker sed la HEF-estraro decidis translokiĝi al la pli konata sistemo de Microsoft. Nun restas la arĥivo de la Biblioteko kiu havas problemon kun kelkaj datumoj "perditaj".

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**NI FERIOS ĜIS LA 18-AN DE SEPTEMBRO
FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ KAJ FRUKTODONAJN
KONGRESOJN**

“El hombre que desafió a Babel”

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. PVP 20 eŭroj.

ĜIS LA FINO DE JULIO 2006: po 23 eŭroj vi ricevos **“El hombre que desafió a Babel”** kaj **“Nuevo Método de Esperanto”** de Fernando de Diego - la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

65 A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

El Puig (10 km de Valencia). 21a - 25a de julio 2006.
Pli da informoj <http://www.esperanto-es.net/congreso 2006>

PROVIZORA PROGRAMO

Solenaj programeroj:

- Solena Malfermo
- Solena Fermo
- Akcepto de la Urbestro
- Ĝenerala Asembleo de HEF
- Ĝenerala Asembleo de "VEF kaj Murcia"

Klerigaj programeroj:

- Prelego far Darío Rodríguez: "Esperanto en Interreto"
- Prelego far Alejandro Pareja
- Festparolado far Rafaela Urueña
- Prezento de "Gazetoteko Lanti", far Jesuo de las Heras
- Ronda tablo, gvidata de Pedro A. Garrote
- Filatela ekspozicio, organizata de Rafael Peris
- Prezento de novaj libroj
- Venontaj kongresoj
- Projekciado de filmoj en Esperanto
- Kurso de Esperanto por progresintoj, far Augusto Casquero

Distraj programeroj:

- Interkona Vespero
- Ekskursoj:
 - Valencia
 - Varianto A: - Urbo de la Artoj kaj la Sciencoj
 - B: - Historia Urbocentro kaj muzeoj
- Sagunto
- Navigebla kaverno de San José (Vall d'Uxó)
- Vizito al la Monaĥejo de El Puig

- Gustumado de "Paella"
- Gustumado de "Sangría"
- Gustumado de "Agua de Valencia"
- Kvizo en Esperanto
- Lotumado (surpriza)
- Nokta plaĝumado

Estas en preparo junulara programo.

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid